



esperanto

Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

n° 113 - somero 2018

leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkotiĝo (kun la gazeto)

6 € - ĉeko al:

"Espéranto-Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la **kasisto**

Nicole Lafitte - Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
nlpolecamp@gmail.com

sekretario

redaktoro kaj enpaŝiganto

Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 30-a de septembro 2018

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

Vorto de la Prezidanto

La studperiodo en nia federacio finiĝis per la ekzamenoj de FEI (Franca Esperanto-Instituto).

Ni povas fine pripensi kion fari dum la nuna somero.

Kompreneble, kuraĝuloj povas daŭrigi la lernadon de sia kara lingvo en Kvinpetalo aŭ Greziljono; eblas ankaŭ partopreni en la Universala Kongreso en Portugalio, viziti eksterlandanojn... aŭ tute simple viziti nian belan landon.

Al ĉiuj membroj de nia federacio, mi do deziras aktivan someron kaj tre agrablan ripozadon.

Pierre Oliva



Federacia agado

okazis:

- prelegturneo de la bulgara verkisto *Georgi Mihalkov*, alinome Julian Modest (*vidu je paĝo 2*)
- ekzamensesio de FEI en *Le Beausset* (*vidu je paĝo 2*)

okazos:

- partopreno de pluraj federacianoj en la UEA-UK en Lisbono (*raporto kaj fotaro en la oktobra numero*)
- decembra kultura semajnfino en *Le Beausset* (*aliĝilo en la oktobra numero*)

Georgi Mihalkov à Marseille et La Ciotat

Auteur en bulgare et espéranto, traduit dans une vingtaine de langues, vice-président de la section espérantiste du PEN-Club, **Georgi Mihalkov** (Julian Modest) s'est arrêté le 5 juin à Marseille, au CIRA, et le 6 juin à La Ciotat (Grand Portique), lors d'une tournée de conférences organisée par Espéranto-France.



Le sujet choisi, "**La vie culturelle dans la Bulgarie d'aujourd'hui**", en a étonné plus d'un ; si nous connaissons tous des auteurs étasuniens même de catégorie B, nous sommes incapables de citer un seul nom bulgare.

Trois époques se partagent l'histoire de la culture bulgare depuis la deuxième guerre mondiale.

Jusqu'en 1960, il faut faire mousser le parti communiste. De 1960 à 1990, en littérature, au théâtre ou au cinéma, les auteurs cherchent l'inspiration dans le folklore et l'histoire de la Bulgarie éternelle, dont la libération du joug turc. Après 1990, donc après la chute du système socialiste, Vasil Lazarov peut écrire un essai sur "Littérature et christianisme", alors que Stefan Tsanev traite des procès truqués du stalinisme.



Esperanta PEN-Centro

Ĝi estas la Esperanto-branĉo de la internacia verkista asocio **PEN-Club**.

Fondis ĝin la 27an de novembro 1991 *Perla Martinelli, István Nemere kaj Giorgio Silfer*. La kvara aliĝinto estis *Gaston Waringhien*.

(legu pli [ĉi-tie](#) ĉe Vikipedio)

Franca Esperanto-Instituto

La celoj de FEI estas:

- organizi ekzamenojn pri scio de Esperanto, kaj atribui la respondajn diplomojn,
- zorgi pri la bona uzado de Esperanto en la eldon-aĵoj, ĉefe en la vortaroj kaj lernolibroj,
- zorgi pri la lingvaj problemoj eventuale kaŭzataj de la uzado de Esperanto fare de franclingvanoj.

(por scii pli pri FEI)

Pour illustrer l'art de l'artiste-peintre Maja Gorova, des tableaux très colorés inspirés par le folklore sont projetés, ainsi que les sculptures de Bogimil Jivkov où règne l'harmonie entre le spirituel et le corps.



une vingtaine de personnes ont assisté à la conférence

Comme toujours, les conférences en espéranto ont été traduites simultanément en français (*ndlr : par R. Triolle*), puis suivies d'un rafraîchissement pour d'autres échanges.



le pot de l'amitié avant de se séparer

Contacts avec les espérantistes locaux : accueil en gare Saint-Charles de Marseille par Rosy Inaudi et Marc Gallardo, visite de Marseille et de La Ciotat avec Renée Triolle, pique-nique à La Ciotat.

compte-rendu de Renée Triolle

Ekzamensesio de la Franca Esperanto-Instituto

Sabaton la 16an de junio, en "*Maison des Frères*" en *Le Beausset*, tri kandidatoj, *Colette Adoue, Chantal Beaumont kaj Monique Flory*, sukcese trapasis la dua-gradan ekzamenon de FEI. La ekzamenantaro konsistis el *Renée Triolle*, direktorino de la ekzamenoj ĉe FEI, *Mari-Roza kaj Pascal Vilain*.




tagmeza manĝo-paŭzo inter la skriba kaj la parola ekzameneroj

El la regionaj asocioj



05 - Espéranto-Gap

Festo de Eŭropo en Embrun la 26an de majo



Ni alvenis sufiĉe frue por pikniki kun junuloj el Grekio, Italio, Skotlando, Germanio. kaj tiel jam konatiĝi kun tiu internacia teamo kaj partopreni ludon rilate al Eŭropo. Sabaton matene, sur granda placo proksime al la bazaro, estis multaj budoj pri Eŭropo, unu el ili temis pri Esperanto. Estis mirinde trovi jam pretigitan budon kaj esti ĉirkaŭitaj de junuloj. Ni povis instali tablon por ludigi la infanojn. Homoj, kiuj vizitis la budojn, estis tre interesataj kaj senhaste vizitis kaj parolis. Iu virino, kies filo laboras por *Greenpeace*, kunportis informilojn pri nia lingvo. Persone mi povis denove kontakti «*Maison de l'Europe 05*» kaj alian asocion de *Embrun*: «*Euroscope*». Espereble kunlaborado okazu danke al tiuj renkontiĝoj.

Tagmeze pluvo falis por akvumi la semojn kiujn ni semis!

raportis Marie-Sylvie kaj Monika

Eurocircle disvolvas kaj efektivas Eŭropajn projektajn, precipe en la kampo de internacia movebleco kaj por promocii integriĝon kaj utiligeblon.

Invititaj de *Eurocircle*, *Marie-Sylvie Julian* kaj *Monique Arnaud* vojaĝis al *Embrun* vendredon posttagmeze por spekti filmon prezentitan en *Savines*: «*Sami, une jeunesse en Laponie*» (premio *LUX* 2017).



13 - Espéranto - La Ciotat

Fête de l'Europe

Dans l'après-midi du 5 mai, Espéranto-La Ciotat a tenu un stand d'information avec leçons express de 10 minutes toutes les heures.

Il y a 150 langues en Europe, 25 sont langues officielles dans l'Union Européenne.

Comment communiquer entre Européens ? C'est la "patate chaude" que se refilent d'année en année les dirigeants. Impossible de choisir la langue d'un pays-membre, ce qui donnerait trop de poids à un pays et aboutirait à des Européens de première ou deuxième catégorie. Il est donc conseillé à tout un chacun de savoir deux autres langues en plus de la sienne. Si n'importe quel collège propose l'anglais, savez-vous où vous pourrez apprendre le danois ou le slovène ? Avez-vous calculé le nombre de combinaisons possibles ? (25 x 24).

Une solution rapide et équitable, c'est de choisir l'es-

péranto, langue "neutre" qui appartient à tous, n'est étrangère à personne, facilite les relations directes et sert de tremplin à l'étude d'autres langues.

(Voir dans *La Documentation Française le rapport Grin*). La base, (vous et moi), sera-t-elle plus ouverte que l'élite qui a fait l'ENA ?

R.Triolle



Rapport Grin

Le rapport "L'enseignement des langues comme politique publique" ou "rapport Grin" tente de répondre aux questions suivantes : «quelles langues étrangères enseigner, pour quelles raisons, et compte tenu de quel contexte ?» Il étudie notamment trois scénarios de politique linguistique au niveau de l'Union européenne : le choix d'une seule langue naturelle, le choix d'un trio de langues naturelles et le choix d'une langue construite, l'espéranto. (*intégralité du rapport à lire [ici](#)*)



13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Forum des langues

Le 19 mai, à la Friche Belle de Mai, nous étions six espérantistes toujours plus motivés que jamais pour présenter notre «internacia lingvo» au «Forum des langues». Nous étions déterminés, motivés, le cœur à l'ouvrage, le stylo prêt à servir. Nous n'avons pas été déçus car nous avons pu rencontrer beaucoup d'individus qui ont déclaré être très intéressés. Pas d'inquiétude, nous avons pris les noms ainsi que les mails. Ils ne nous échapperont pas...

Ces nombreux contacts nous ont permis de constater que beaucoup de personnes connaissaient l'espéranto qui bénéficie d'une bonne image en raison de son concept même.

Nous avons été invités par l'association «bouleguez» dont l'organisation a été irréprochable d'un avis unanime. Un grand bravo. Nous étions en bonne compagnie avec une vingtaine d'associations incarnant chacune, sous forme ludique voire même récréative, une expression linguistique, culturelle, artistique, gastronomique etc. Il y avait des Bulgares et des Roumains avec leurs danses, des Catalans avec leur Sardane. Étaient là, mais sans la sardine, les Provençaux de l'Ostau dou pais marseillais, les Berbères avec leurs chants mélodieux. Nous avons apprécié aussi des rythmes africains endiablés de diverses origines, comme entre autres la Guinée Bissau, le Cap vert etc. Les Basques avaient sorti leurs bérets et leur parler d'origine toujours aussi mystérieuse. Les Kurdes avaient confectionné des gâteaux tout aussi mystérieux quant au goût. Les Italiens avaient aussi leurs spécialités plus en nos cordes et tout aussi savoureuses. Sur leur lancée gestuelle, nous avons pu aussi échanger avec la langue des signes. J'ai bien peur d'oublier du monde...



le stand
d'Espéranto
Marseille

durant
la conférence
donnée par
Chantal
et Victor



En sus des stands, il y avait aussi des conférences sur le thème : «Marseille polyglotte depuis des millénaires», des expositions et des concerts.

En bref, la Friche était pleine d'exposants, de visiteurs, de bruits, de chants, de danses...

Il existe actuellement en France une trentaine de Forum des langues ; le 1er quant au nombre de visiteurs et sur la plan chronologique se tient à Toulouse. On dénombre maintenant plus de 120 exposants et un grand impact sur toute la ville. Son organisateur, Michel Sicre, était avec nous.

compte-rendu de Marc Gallardo

Ont participé à l'événement pour Espéranto-Marseille Chantal Beaumont et Victor Grousset, qui ont assuré une conférence, Rosy Inaudi, Liliane Alazraki, Marc Gallardo, Eric Streichemberger et Thierry Spanjaard.



83 - Espéranto - Le Beausset

Ekzamenoj... kaj sukcesoj

La 16an de junio, nia klubo organizis ekzamensesion, je la dua nivelo de FEI, por nur tri kandidatinoj, du el nia klubo kaj unu el Marsejlo. Ni ricevis informon pri la sukceso de la tri kandidatoj. Gratulojn al ĉiuj!

Nicole kaj Pierre gratulas Colette Adoue kaj Monique Flory ne nur pro ilia sukceso sed ankaŭ pro ilia sinprepara laboro.

Pierre gratulas ankaŭ Nicole pro ŝia sukceso ĉe la C1-nivelo de la KER-ekzameno, kiun ŝi trapasis en Greziljono dum la printempa sesio 2018.

Freŝdata informo

La estrino de «*Pôle Saint-Exupéry*» informis nin, ke ekde septembro nia klubo disponos denove, kiel antaŭe, pri du klasĉambroj kaj la komputilĉambro.

Ni ĝojas pro ĉi tiu bona novaĵo!

raportis Pierre Oliva



Memore al...

Ni havu penson por nia amikino kaj samideanino *Christiane Puydebois*, kiu forlasis nin la 22an de marto. Ŝi forpasis per «veluraj paŝoj», kiel tiu dombesto, kiu simbolas korinklinon, sindonemon, dankemon kaj kvietigon: la kato.

Katojn ŝi adoptis multajn. Kun amikino, ŝi kreis «kor-restoracion por katoj». Ne nur pri katoj ŝi zorgis, sed ankaŭ pri malfortaj, malriĉaj, malfeliĉaj uloj.

Ŝi daŭre vivis kiel sinjorino *Puydebois*, edzino de lernejestro, sed tamen ŝatante liberecon, aŭtonomion, kaj sian «sekretan ĝardenon»: la vagadon (ŝi multe vojaĝis). Eble ŝi samopiniis pri malobeemo kiel ŝiaj ribelemaj katoj *Fifi, Grigri, Noïrot*.

En siaj lastaj jaroj, ŝi ĝuis kvietecon, atentan observadon, silenton.

Dum siaj lastaj tagoj, kun la okuloj mezfermitaj, ŝi tiel vidis sian finiĝantan vivon: bona ŝanco!

Pro laceco haltis ŝia koro : ŝi estingiĝis (laŭ ŝia filo) kiel kandelo...

Por ŝi, en niaj koroj, restas amikeca fajrero.

Anita Collomb kaj ŝiaj geamikoj de Espéranto-Provence.

La membraro de Espéranto-Provence sincere funebras kaj kondolencas la familianojn de sia samideano Christiane Puydebois.

Tradicia junia renkontiĝo

Ĝi okazis kiel kutime en la restadejo *Val d'Esquière*, en *Les Issambres*, dimanĉon la 24an de junio.

Partoprenis en ĝi pli ol dudek membroj aŭ simpatiantoj de la klubo.



Vojaĝemaj federacianoj

Kastelo Greziljono

Zorgante pri nia Esperanto-nivelo, ni partoprenis en printempa staĝo en la fama Kulturdomo de Esperanto, apud *Baugé*.

Temis pri intensaj kursoj kaj eventuala preparado al KER-ekzamenoj, je ĉiuj niveloj, de A1 ĝis B2 kaj parto de C1. *Przemek Wierzbowski*, pola kursgvidanto, laborigis nin en studfavora kaj tre agrabla etoso. Lia kurso koncentriĝis je pliampleksigo de vortprovizo per konversacioj, rakontoj, rolludoj. Li pritraktis ĉiujn gravajn gramatikaĵojn. Danke al li, multaj lernantoj sukcese trapasis la ekzamenojn B1 ĝis C1.



Ĉiuvespere okazis prelegoj, ekz. pri Litovio, Koreio, Zamenhof, kaj ludoj, kantoj...

Ni agrable tendumis sur herbejo kaj multe gustumis diversajn nutraĵojn. Pluraj lokaj ekskursoj estis planitaj. Ni havas belajn memoraĵojn!

raportis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

La Bastide sur l'Hers

Esperantaj revuoj oportune informas nin. Tiel mi legis en «*Espéranto-Info*» pri ĉiujara staĝo de ĥora kantado, organizita de «*Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariège*». Ĝi okazis en ĉarma vilaĝo, «*La Bastide sur l'Hers*», kaj estis estrita de la nederlanda esperantisto *Rineke Hoens* kaj de la ĥoro «Akordo»: unu semajno, kvin muzikaj horoj tage, kaj diversaj distraĵoj.

Ni kantis kvarvoĉajn tradiciajn kanzonojn el diversaj landoj, kiuj temis pri paco, amo, naturo, laboro.

Staĝfine okazis du publikaj koncertoj. Unue en «*Dun*» kun «*Balo Voĉe*» kiu kantis en la okcitana kun la ĥoruso «*Cor de Cantara*»; due en *Fargeaux*, kun la grupo «*Ar Vag*» el *Gruissan*, kun bretonaj maristaj

kantoj. Antaŭ nia foriro ni distris pensiulojn de «*La Lausada*» en la vilaĝo.

Se vi ŝatus amatores kanti en gaja kaj malstreĉa etoso, ne hezitu! Vi renkontos ĉiuaĝajn francajn kaj eksterlandajn esperantistojn kaj ankaŭ lokajn kantistojn ne ankoraŭ esperantistojn.

La venonta staĝo okazos en februaro 2019.

info: CEEA Esperanto - esperanto.ariège@free.fr

tel:33/0 468 605 417



raportis Nicole Lafitte

5a IREK – Rapida sperto kun Persaj esperantistoj

Thierry Spanjaard

Mi tutbonŝance partoprenis en IREK-5, la 5a Irana Esperanta Kongreso, komence de aprilo.

Mi alvenis en la Teherana flughaveno, post unu nokto da vojaĝo, haltis en la hotelo kaj tuj iris al la kongresejo. Mi tuj malkovris la taksadon de distancoj laŭ la Teherananoj: ili konsilis al mi hotelon, dirante ke ĝi estas proksima al la kongresejo. Fakte ĝi estis 15 kilometrojn for, tio signifis almenaŭ 20 minutojn da taksivojaĝo sur multnombraj aŭtoŝoseoj kaj ekspresvojoj.

Kiam mi alvenis en la kongresejo, la kunveno jam komenciĝis de kelkaj dekoj da minutoj. La tiama programero estis la bondeziroj de eksterlandanoj. Do, mi eĉ ne povis sidiĝi: kiam mi eniris la kunvenĉambron, mi devis tuj iri sur scenejon kaj diri kelkajn vortojn de sinprezentado kaj bondeziroj. Mi ne kapblas bone improvizi, do nur diris kelkajn sensukajn parolojn.



La kongreso kunvenigis ĉirkaŭ 30 partoprenantojn venintajn de diversaj regionoj de Irano kaj nur kelkajn eksterlandanojn: *Annie Gerinte*, Francino kiu kutime loĝas en Kreto, *Benjamin*, Usonano loĝanta en Irano, lia Taĝika edzino, kaj mi. En la partoprenantaro estis ankaŭ aktivegaj esperantistoj, kiuj subtenas nian internacian lingvon multmaniere.

Ili organizas regulajn kursojn en siaj lokoj, ĉefe en lernejoj kaj universitatoj. Aliaj multe agas pere de Interreto kun konstanta ĉeesto sur diversaj retoj.

Pluraj el la partoprenantoj ankaŭ ofte vojaĝas ekster la lando kaj partoprenas en Esperantaj aranĝoj tutmonde. Fine, pluraj el ili verkas Esperante, ĉu originalajn verkojn, ĉu tradukojn al Esperanto aŭ al la persa. Partoprenis en la kongreso ankaŭ pluraj komencantoj aŭ preskaŭ komencantoj.

La kongreso mem enhavis multajn prelegojn pri tute diversaj temoj:

- Raporto de IREA far *Nazi Solat*, prezidantino
- Raporto de IREJA, Irana Esperanta Junulara Asocio
- Akvaj problemoj de la Kaspia maro
- Mezoriantaj kaj Nord-Afrikaj kongresoj
- Famaj Persaj esperantistoj
- Poemoj
- Ŝercoj
- Vojaĝaventuroj
- Monda gastronomio
- Reptiliumado (krokodili, aligatoroj, ktp)
- Kaj aliaj...

Dum la unua tago, mi estis petita de la organizantoj prezenti prelegeton. Do vespere, mi adaptis antaŭan prelegon, aldonis kelkajn ideojn pri la metromapo de Teherano, kaj la duan tagon, mi donis rapidan version de mia prelego pri metromapoj, kiun kelkaj inter la Provencanoj jam vidis dum nia Marsejla kongreso en 2016.

La kongreso enhavis iom da libera tempo dum paŭzoj kaj manĝo. Tiam mi bone povis babilu kun multaj el la partoprenantoj, interŝanĝi pri iliaj multaj agadoj en Esperantujo, pri Persa kaj Irana kulturoj kaj abundaj aliaj temoj.

Sro *Mamduhi*, unu el la partoprenantoj kaj ĉef-delegito de UEA en Irano, estis sufiĉe afabla por inviti min al vizito de lia loĝloko, biciklado ĉirkaŭ artefarita lago, kaj vespermanĝo ĉe li. Ni multe babilis, tiel mi havis bonegan vesperon kaj iom spertis la vivmanieron de Irananoj.

Unuatage, posttagmeze, ni ekskursetis en Teherano. Tiam mi malkovris, ke la urbocentro estas ankoraŭ 10 kilometrojn for de la kongresejo! Ni piediris sur la *Sir e Tir* strato, kie staras moskeo, evangelia kaj armena preĝejoj, zoroastra templo, sinagogo, ...

La tria tago de la kongreso estis la ekskursita tago. Ni iris al *Masuleh*, vilaĝo en la *Alborz* montaroj. Denove, mi spertis la taksadon de distancoj de la Irananoj: ili diris, ke *Masuleh* sufiĉe proksimas al Teherano, sed tio signifas 6 horojn da busado por iri tien kaj pli ol 6 horojn por reveni al Teherano, pro longaj aŭtoŝtopiĝoj.

Masuleh estas alloga por Irananoj ĉar tiu montara regiono estas ofte humida, kaj tie kuŝas verdaj kaj humidaj arbaregoj. Homoj ĝojas vidi nubojn en la ĉielo kaj sperti nebulon. Ni paŝis nur malpli ol tri horojn en *Masuleh*. La vilaĝo estas konstruita sur flanko de la monto. La kresko de la loĝantaro kaj la manko de spaco faras, ke la domoj estas konstruitaj

proksimege unu de la alia, kaj la tegmento de unu domo samtempe estas la korto de la supra domo. Oni iras tra la vilaĝo nur piede per multaj ŝtuparoj. Kiam ni alvenis al *Masuleh*, nia grupeto renkontis aliajn esperantistojn de la regiono, kiuj preparis grandan Esperantan ŝildon kaj disdonis verdastelajn flagetojn al ĉiuj.



Tiel nia vizito al la vilaĝo iĝis Esperanta propaganda turneo. Multaj el la Iranaj turistoj, kiuj vizitis *Masuleh* tiutage, jam aŭdis pri Esperanto kaj interesiĝis pri la internacia lingvo kaj pri nia grupo.

La partoprenantoj ankaŭ volis konservi memoraĵojn de tiu ekskurso. Ni faris multajn grupajn fotojn kaj memfotojn. Verŝajne pli ol mil fotoj estis faritaj de la dudek partoprenantoj dum du horoj!



El la mesaĝkesto de la legantaro

Jean-François Cousineau

Mi ĵus ricevis la ĉiam tre atenditan provencan bultenon kaj fier(eg)e anoncas al vi ke mi finfine sukcese malkovris unu eraron... en franca teksto!

Espereble ĉi foje mi pli rapide reagis ol la terure efika Philippe ĉi kampe! Ĉu mi gajnis ion? Libion en la franca oni skribu 'Libye' (ne 'Lybie') male al Syrie (Sirio)... Mi do esperas ke vi havas *siriozan* alibion por klarigi al la legantoj la kialon de tiu nepardonebla postrestanta eraro... kaj mi estas '*tri... poli*'! (bv. min senkulpigi pri tiu ĉi tre duba vortludo krome nur komprenebla de francoj: mi tute ne kapablis rezisti!). Ĉu problemo de *libi-ido*? Ĉiuokaze venontan fojon vi estos senigita de de(z)erto!

respondo de la red.

Ĉu vi scias, kiel mi agis dum mia tuta instruista kariero? Mi ĉiam vole enmetis erarojn en tekstoj skribitaj sur la verda tabulo, kun la celo, ke miaj lernantoj trovu ilin. Mi same faris ĉi foje en nia gazeto... kaj vi trovis!

Jes ja, vi do gajnis ion : la titolon de la plej diligenta leganto de nia gazeto!

Thierry Spanjaard

Dankegon pro la bulteno! Mi bone notis vian peton pri raporteto okaze de mia rapida renkontiĝo kun Barcelonaj esperantistoj... sed prokrastis, kaj prokrastis, kaj prokrastis, kaj prokrastis,... Kaj nun mi ricevas la publikigitan version de la bulteno kaj ekkonscias, ke mi neniam sendis al vi tiun raporteton. Bonvolu pardoni mian senliman prokraston. Por kompensi, mi promesas veran raporton pri IREK, la Irana Esperanto Kongreso!

respondo de la red.

Efektive, kial prokrasti tion, kion vi povas tuj fari? Sed eble vi estas adepto de alia agkutimo: kial tuj fari tion, kion vi povas prokrasti ĝis pli foraj tagoj? Tamen, ne tro prokrastu pri IREK, ĉu? (Intertempe vian raporton mi ricevis kaj enpaĝigis... dankon!)

Rose-Marie Quintin

Dankon pro la federacia gazeto. Ĝi estas ĉiam interesa kaj bone prezentita. Mi printos ĝin kaj proponos al la klubanoj, ke ili konsultu ĝin.

respondo de la red.

Dankon pro via laŭda opinio pri nia gazeto, Rose-Marie! Eble aliaj Avinjonaj klubanoj emos aniĝi al nia federacio?

Philippe Chavignon

Gratulon pro la informkvalito de la bulteno.

En Kostariko "pura vida", kiel ĝi estas uzita, signifas "viv-plene", ne "pura vivo". Hugo Mora povos konfirmi tion laŭbezone.

respondo de la red.

Dankon, Philippe! Via rimarko pri la esprimo «pura vida» emigis min enketi pri ĝi, kaj mi komprenis, ke eblas doni plurajn signifojn pli malpli similajn: «profitu la vivon», «ĝuu veran, plenan vivon»... Ĝi estas ĉiumomenta esprimo por saluti, rideti al la aliaj, ek-konversacii, helpi... ĉiam kun bonhumoro.

Ne vere «oficiala» devizo, do. La lando havas iun tian: «¡Vivan siempre el trabajo y la paz!» («Estu por ĉiam laboro kaj paco!»)

Liliane Alazraki

Dankon, Pascal.

respondo de la red.

Mi plu emas redakti kaj enpaĝigi nian gazeton; plaĉas do al mi scii, ke legantoj plezure ricevas kaj legas ĝin.

Liba Gabalda

Korajn dankojn pro ricevita «PACA»-gazeto, en kiu mi trovis allogan artikolon de Roselyne Favier pri Kostariko. Des pli mi ĝojis, ĉar mi povis denove ĝui la vojaĝon kaj kompari ĝin kun niaj spertoj. Ni estis tie preskaŭ samtempe, de la mezo de decembro ĝis la mezo de januaro, kaj renkontis du aliajn esperantistojn.

respondo de la red.

Estas fama diraĵo, kiu asertas, ke nia mondo etas. Ankaŭ tiu de la esperantistoj, ŝajne!



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

jusqu'au 30 juillet : Marseille

le Mucem et le Festival de Marseille présentent une installation/parcours/performance titré "Domo de Eŭropa historio en ekzilo"

septembre 2 - Fréjus

forum des associations et pique-nique à la Base Nature

septembre 8 - Manosque

forum des associations - parc de Drouille

septembre 8 - La Ciotat

forum des associations - Parc du Domaine de la Tour

septembre 9 - Marseille

Vivacité, fête des associations au Parc Borely

1er jeudi de chaque mois (reprise en octobre) :

l'espéranto est parlé à l'Équitable Café,

54 Cours Julien, 13006 Marseille

décembre 1-2 - Le Beausset : fin de semaine culturelle

2019 mars 2-9 - Les Issambres

Méditerranée Espéranto-Semajno

en France

Château de Grésillon - Baugé (49)

juillet/août : programme d'été

<http://gresillon.org>

août 19-26 - Métabief (25) : séjour dans le Haut-Jura, avec ou sans cours d'espéranto
stagemetabief@orange.fr

en Europe

juillet 21-28 - Madrid (Espagne) : 51ème congrès de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

kongreso2018@esperanto.es

juillet 28 /août 4 - Lisbonne (Portugal)

103ème Congrès Universel d'Espéranto

<https://www.uea.org/kongresoj/UK>

août 5-12 - Kragujevac (Serbie)

congrès annuel de SAT

financoj@satesperanto.org

août 18-25 - San Marino (Italie) : 85ème congrès italien d'espéranto

kongreso@esperanto.it

Pro manko de loko, ĉar ĉi tiu gazeto estas nur 8-paĝa pro la aldonitaj MES-aliĝiloj, vi ne retrovis la kutimajn rubrikojn: "ZEO-oj en PACA" kaj "Paĝo de la komencantoj". Ili enestis la aŭtunan numeron 114.